## Faulhaber-semajnfino

### ĉe la najbaroj

Faulhaber-semajnfinoj estis kunvenoj kiujn organizis FLE kaj poste Esperanto Nederland dum multaj jaroj, kun eduka kaj krome amuza programo. Dum la lastaj jaroj ĉiam malpli da partoprenantoj venis en la aŭtuno al la konferencejo Mennorode, kiu per siaj ĉiam pli altaj prezoj ankaŭ siaflanke ne faciligis la partoprenadon. Necesis trovi alian formon, kaj niaj najbaroj, la germanaj esperantistoj en Münster, faris tre bonvenan proponon: komunan festadon de jubileo. Antaŭ 100 jaroj Esperanto aperis en tiu urbo kiu poste multe kontribuis al la florado de Esperanto en Germanujo.

Rezulte do, kultura semajnfino „Esperanto inter najbaroj“ gastigis de la 19a ĝis la 21a de oktobro 2007 en la urbeto Nordwalde apud Münster 81 esperantistojn. El ili 37 estis nederlandanoj – grandparte tiuj kiuj kutime partoprena-



dis la antaŭajn Faulhabersemajnfinojn. Ili tuj sentis sin hejme en la Junulara klerigejo, kiu nur malmulte malsuperis la lukson kaj komforton de Mennorode. Organiza komitato de ne malpli ol 14 germanaj kaj nederlandaj esperantistoj perfekte preparis ĉion ĝis la plej eta detalo. Inter alie 16-paĝa „kongresa libro“ troviĝis en la dokumentujo por ĉiu partoprenanto.

La vendredan programon malfermis Hedwig Fischer, prezidanto de Esperanto-Societo Monastera per bonvenigaj vortoj, kiujn tuj respondis la prezidantino de Esperanto Nederland, Ans Bakker-ten Hagen.

D-ro Rudolf Fischer tiam kondukis nin al la pratempo montrante fotojn ekde la 22a de oktobro 1907. Tiam, antaŭ precize unu jarcento kelkaj gimnazianoj fondis Junularan Esperanto-Klubon. Estis granda bonŝanco retrovi tiun al-



bumon, kiun kompilis la tiama prezidanto de la klubo, Otto Marquard. Trafoliumante nun kun ni la albumon, d-ro Fischer devis plurfoje mencii ke la junuloj kiuj tiam aktivis por Esperanto, finis sian junan vivon post nemultaj jaroj en la milito 1914-1918.

Post ĉi tiu retrorigardo al junulara fervoro sekvis kontrasto kaj samtempe similaĵo: du junaj muzikistoj, Gunnar Fischer kaj Sebastian Hoffmann kantis en Esperanto pop-stile. Ilia granda entuziasmo instigis la publikon al samentuziasmaj reagoj.

La matenon de sabato du eminentuloj prezentis prelegojn: d-ro Ziko van Dijk ĵonglis per historiaj faktoj kaj epizodoj por reliefigi la 30-jaran militon kiu finiĝis per packontrakto elnegocita kaj fine subskribita en Münster en la jaro



1648. Tiu packontrakto ankaŭ finis la militon de la nederlandaj ribeluloj kontraŭ la hispana reĝo. La norda parto tiam fariĝis sendependa respubliko – kiu evoluis al la lando kie ni nun vivas.

Tute alispeca estis la dua prezentaĵo. Ed Borsboom ridigis la aŭskultantojn montrante kiel arbitra estas la pasporto. Tio estas memorinda ĝuste nun, kiam naciemaj aŭ naciistaj politikistoj postulas ke Nederlandano havu nur unu pasporton. Iliajn argumentojn la preleganto efike subfosis.

Posttagmeze la urbo Münster montris al ni siajn trezorojn. La dua mondmilito detruis multon, sed kun granda zorgo la rekonstruado fidele sekvis la originalon. Loka esperantistino rakontis ke jam en 1948, tri jarojn post la militfino, la Lamberta preĝejo estis rekonstruita per donacoj de la civitanoj.



La amuza programo atingis sian klimakson en la sabata vespero, kiam folklora vira kanthoro prezentis multajn kantojn en la regiona lingvo kaj eĉ plurajn en Esperanto.

Je la dimanĉmateno Nora Caragea traflugis kun ni kelkajn librojn kiujn ŝi mem tradukis. Per kelkaj vortoj ŝi enkondukis ĉiun libron kaj citis fragmenteton aparte trafan. Ŝia gvidado daŭris tro mallonge. Sed venis la horo por adiaŭo.

Pluvis ekstere por substreki tiun etoson. Ĉiuj kunlaborantoj ricevis Esperanto-tulipojn. Multaj dankoj kaj aplaŭdoj direktiĝis al la gastiga skipo, sed ni ne forgesu ke ankaŭ Els van Dijk, Ineke Emmelkamp kaj Els ten Hagen dum unu jaro okupiĝis pri preparado de tiu ĉi Kultura Semajnfino. Dankon al ili!

Oni jam parolas pri nova renkontiĝo en februaro 2011, kiam Esperanto-Societo Monastera festos ke ĝi estas fondita antaŭ 100 jaroj. Se vi jam havas notlibron pri tiu jaro, nepre notu la daton.

*Hans Bakker*
*Nederlando*